

La 21-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Strasburgo

Oldřich Arnořt Fischer kaj Gabriella Stier

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 9-an de septembro 2015

Komuna kongreso de KELI kaj IKUE okazis en hotelo C.I.A.R.U.S (7, rue Finkmatt) en Strasburgo ekde la 1-an ĝis la 8-an de aŭgusto 2015. Inter 58 partoprenantoj el 17 landoj (Aŭstrio, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Francio, Germanio, Grandbritio, Hungario, Italio, Koreio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Svisio) estis ankaŭ du infanoj, hungaraj knaboj. Ĉeĥan Respublikon reprezentis prezidanto de ĉeĥa KELI Pavel Polnický el Poděbrady kaj Oldřich Arnořt Fischer el Brno.

Strasburgo (franclingve Strabourg, alzaclingve Strossburi kaj germanlingve Straßburg) estas la ĉefurbo de la departamento Malalta Rejno en la regiono Alzaco, plej oriente de Francio. En Strasburgo loĝas ĉirkaŭ 272 mil da loĝantoj. Krom francoj tie loĝas ankaŭ germanoj, araboj, judoj, Azianoj kaj Afrikanoj. Strasburgo estas urbo malfermita kaj kosmopolita, kie katolikoj kaj protestantoj vivas harmonie kaj preĝas en la sama Katedralo. En parto de la insulo de rivero Ill situas impona gotikstila Katedralo Nia Sinjorino, kiu estis konstruata dum la jaroj 1176 – 1439, kun ĝia pinaklo alta 142 m. La Katedralo estas ornamita per amaso da statuoj, astronoma horloĝo kaj belaj vitraloj. Sur la insulo situas malnova kvartalo kun lignokradaj dometoj, iama kunvenejo de fiŝkaptistoj kaj muelistoj; hodiaŭ en la dometoj estas metiejoj.

La urbo estis fondita antaŭ pli ol 2000 jaroj. Ĝi origine estis romia kampo. Strasburgo en mezepoko estis centro de reformacio, tie loĝis alzaca reformatoro Martin Bucer (Butzer, 1491 – 1551). Dum centoj da jaroj Strasburgo kelkfoje apartenis aŭ al Francio, aŭ al Germanio. Franca nacia himno „La Marseiljezo“ estis komponita ĝuste tie (la 25-26-an de aprilo 1792, la aŭtoro estis Claude J. Rouget de Lisle (1760-1836)). La urbo havas la plej gravan riveran havenon de Francio.

Strasburgo estas ankaŭ signifa centro de Esperanto-movado. Tie naskiĝis Sophie Marie-Aline Menu de Ménil kaj ankaŭ Carlo Bourlet, fama sciencisto, unu el la plej grandaj esperantistoj kaj amiko de Zamenhof. Post la unua mondmilito venis tien Hubert Ferez; tiu granda aktivulo multjare prezidis la Esperantan grupon, kiu tiam ege prosperis. En Strasburgo estas gastiganto de Pasporta Servo. En la urbo estis la 21-an de oktobro 2003 fondita la Federacio Eŭropo – Demokratio – Esperanto. Okaze de la eŭropaj balotoj (2014) la Federacio ricevis 99 voĉojn (0,17 % de voĉoj).

Strasburgo estis la loko de la Internacia Junulara kongreso en la jaro 2001 (<http://ijk2001.free.fr>). Ekde la jaro 2001 Esperanta-delegacio partoprenas en la Eŭroskola-tagoj, kiujn ĉiujare organizas la Eŭropa Parlamento (<http://e.euroscola.free.fr>).

Prezidanto de loka esperantista klubo informis nin, ke la klubo havas 30 klubanojn. Ili renkontiĝadas ĉiusemajne kaj ĉiam post unu monato aranĝas aperitivan renkontiĝon – www.esperanto-strasbourg.net .

Zorgo de prezidanto de KELI, Philippe Cousson, Samuel Gaillard, pastro Albrecht Kronenberger, muzikisto Stefan Lepping k.a. kune kun entuziasmo de ĉiuj kreis etoson de amikeco kaj interkompreno.

La kongresoj, kie ni povas renkontiĝi kun kristanoj de multe da landoj, ĉiam estas por ni grandaj eventoj. Ni kun Esperanto konatiĝas kun lokoj, kiujn ni sole ne povus viziti, kaj kun interesaj homoj, esperantistoj.

Sed ĉi-jara kongreso en Francio estis alia ol la antaŭaj kongresoj. Post terorisma atako kontraŭ la redakcio de franca satira ĵurnalo Charlie Hebdo nian hotelon, fervojan stacidomon kaj sinagoton gardis francaj soldatoj.

La riĉa programo de la kongreso estis bone pripensita kaj kompilita. Interesa estis filmo pri Eŭropa Parlamento. Katolikaj kaj ekumenaj diservoj, komunaj kantadoj laŭ kantareto Adoru, prelegoj kaj ekskursoj en alzacan urbon Obernai, Monton de Sankta Odilia kaj vilaĝon Gertwiller donis al la partoprenantoj okazon amuziĝi, sed ankaŭ serioze ekpensi pri la kongresa temo, demando „Donu al mi trinki“ (Johano 4,7) „La malsameco pliriĉigas min“. Sankta Odilia de Alzaco (662 – 720) estas patronino de bona vido kaj Alzaco.

La prelegoj estis bone preparitaj kaj interesaj. Ĉina kristano Zhang Fude rakontis pri vivo de kristanoj en Ĉinio. Lia avino estis malliberigita en ĉina koncentrejo miloj da kilometroj de sia hejmo 20 jarojn nur pro tio, ke ŝi estis kristanino. Sed danke al sia forta kredo li transvivis eĉ tiel longan malliberejon kaj revenis hejmen. Siegfried Krüger prelegis pri Hajlbrono (Heilbronn) kaj la akvo. Teologoj Gerrit Berveling, Gérard Siegwalt kaj Emmanuel Wald prelegis pri diversaj tradukoj de la Sankta Biblio.

Partoprenantoj de la Kongreso povis aĉeti librojn, inter aliaj satiran komedion de juna moravia aŭtorino Blanka Fišerová „Ĉerkoturneo“.

En la preĝejo Sankta Petro Juna Protestanta ni aŭskultis du orgenajn koncertojn de orgenistoj Thomas Kientz kaj Stefan Lepping.

Krom valoraj prelegoj kaj interesaj diskutoj ni vizitis preĝejojn de diversaj eklezioj (romkatolika, evangelia, metodista, ortodoksa, juda). En la metodista preĝejo ni trarigardis biblian ekspozicion. Tie estis ne nur faksimilo de paĝo de la plej malnova franca Biblio el la 14-a jarcento, sed ankaŭ granda kolekto de Biblioj en diversaj lingvoj. Ni trovis la Bibliojn en hungara kaj ĉeĥaj lingvoj, la Biblion presita en Brajlo; kompreneble ne mankis la Sankta Biblio en Esperanto. Atesto de helpo de francoj al homoj de socialismaj landoj estis malgrandaj paĝoj de la Biblio, kiujn oni enmetos en kovertojn de leteroj, kiuj estis forsendotaj en Sovetunion. (Bedaŭrinde, laŭ mia sperto, sovetaj policianoj ofte malkovradis kovertojn de eksterlandaj leteroj kaj kontrolis enhavojn.)

En la tuttaga ekskurso ni vizitis alzacan regionon, urbeton Obernai, kiu kun siaj lignokradaj, belegaj dometoj aspektas kiel fabela urbo. Ni admiris tie la romkatolikan gotikan preĝejon, la Sinagoton kaj la muregojn de la iama fortikaĵo.

Poste sur la Monto Sankta Odilia ni vizitis la monaĥejon, rigardis la preĝejon kaj kapelojn konstruitajn en bela natura ĉirkaŭaĵo. De sur la montopinto ni povis vidi la landon eĉ ĝis la germana Nigra Arbaro (Schwarzwald).

En vilaĝo Gertwiller ni vizitis la Muzeon de mielkuko.

Estis interesa la vizito en Eŭropa Parlamento, grandioza konstruaĵo, kie laboras niaj deputistoj. Se reprezentantoj de 28 membraj ŝtatoj de Eŭropa Unio parolas 24 lingvojn, ili bezonas 1.800 tradukistojn. Kelkaj de ni fajre diskutis kun franca ĉiĉeronino pri ebla rolo de Esperanto en Eŭropa Parlamento. La ĉiĉeronino eksplikis, ke la deputistoj jam estas tiel kutimitaj paroli anglan, francan kaj germanan, ke oni ne bezonas solvi lingvajn problemojn. La Parlamento provizore funkcias sen Esperanto.

Impresis nin la granda sinagoto, nomita Sinagoto de la Paco.

Plej multe sorĉis nin la belaj balkonoj, la lignokradaj konstruaĵoj, la rivero Ill kun ĝiaj floroplenaj pontoj, anasoj, cignoj kaj la promenadŝipoj.

Estis bona sento ĉiutage preĝi kune kaj kanti kune la belegajn religiajn kantojn, tiel ni pli profunde sentis la amon kiu ligas nin unu al la alia.

Korea esperantistino Min Hyeongkyeong invitis nin al la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Seulo en la jaro 2017 (www.esperanto.or.kr, www.facebook.com/kejesperanto, www.esperanto.co.kr).

Venonta kongreso de KELI okazos en Bratislava, ĉefurbo de Slovakio (2016).

Sed nun kelkaj vortoj al nia temo („Donu al mi trinki“ Johano 4,7)

Evangelisto Johano rakontas pri renkontiĝo de Jesuo Kristo kun Samarianino. Kio tiam okazis?

„Kiam do la Sinjoro sciis, ke la Fariseoj aŭdis, ke Jesuo faras kaj baptas pli multe da disĉiploj, ol Johano (kvankam baptadis ne Jesuo mem, sed liaj disĉiploj) li foriris el Judujo kaj reiris al Galileo. Kaj li devis trairi tra Samario. Li alvenis do al unu urbo Samaria, nomata Siĥar, apud la terpeco, kiun Jakob donis al sia filo Jozef; kaj la fonto de Jakob estis tie. Jesuo do, lacigita de sia vojirado, sidiĝis tiamaniere apud la fonto. Estis ĉirkaŭ la sesa horo.

Venis virino Samaria, por ĉerpi akvon; Jesuo diris al ŝi: Donu al mi trinki. Ĉar liaj disĉiploj jam foriris en la urbon, por aĉeti nutraĵojn. La Samarianino do diris al li: Kiel vi, estante Judo, petas trinki de mi, kiu estas Samarianino? (Ĉar la Judoj ne interrilatas kun la Samarianoj.) Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Se vi sciis la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon. La virino diris al li: Sinjoro, vi nenian ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda; de kie do vi havas tiun vivan akvon? Ĉu vi estas pli granda ol nia patro Jakob, kiu donis al ni la puton, kaj trinkis mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj liaj brutoj? Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos; sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo.“

Johano 4, 1-14

Samario estis urbo, kiu situas ĉirkaŭ 100 km norde de Jerusalemo. Reĝo Aĥab tie konstruis la domon de pagana dio Baal (I Reĝoj 16, 31-33) kaj lia edzino Izebelo, kiu kompliciĝis kun paganaj profetoj de Baal kaj Aŝtar kontraŭ juda profeto Elija (I Reĝoj 18, 19). En la jaro 721 antaŭ Kristo konkeris Samaron asiria reĝo Sargon II kaj samarianoj estis fortrenitaj en Asirion. Kiam ili revenis, volis malebligi konstruadon de la templo en Jerusalemo (Ezr 4). Ili ankaŭ helpis al Apolonio en batalo kontraŭ judoj (1 Mak 3, 10). Tial judoj malamamis Samarianojn kaj la samarianoj malamamis judojn. Ili ne volis interrilati. Sed Jesuo kondukis al Samarianino bele.

Jesuo Kristo ankaŭ rakontis pri kompatema Samariano, kiu kondukis pli bone ol judoj:

„Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon? Kaj li diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas?

Kaj li responde diris: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimumon kiel vin mem. Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi vivos. Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas mia proksimumo?

Jesuo respondis kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone senviva. Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke.

Kaj tiel same unu Levido, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj metis lin sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li. Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis lin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspezos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos.

Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton. Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman.“

Luko 10, 25-37

Jesuo sciis, ke Samarianoj estas aliaj ol judoj, sed li akceptis ilin. Tial ni pensu pri tio, ke **estas necesa akcepti homojn, kiuj estas aliaj ol ni**. En hotelo C.I.A.R.U.S. en Strasburgo estis multenombra grupo de homoj, kiuj estis psiĥike malsanaj. Ili aspektis alie, kondutis alie, sed ili estis bonkoraj kaj kondutis ĝentile. Kaj ni observis, ke ili havas sian programon, amuziĝis kaj ĝojis pri bela hotelo kaj bela urbo – same kiel ni. En ĵurnaloj oni nun ofte skribas pri rifuĝintoj el afrikaj kaj aziaj landoj, kie estas militoj. Ili serĉas novan hejmon. Jes, ili estas iomete aliaj ol Eŭropanoj, sed ni akceptu ilin!

Jesuo ankaŭ kondutis bele al **virinoj**. Ankoraŭ en la 21-a jarcento la virinoj ne ĉie povas vivi feliĉe.

Tial ni legu la Bibliion kaj pensu pri la Vortoj de la Dio. Sed precipe, kiel kantis niaj ŝatataj humoristoj Jiří Voskovec kaj Jan Werich: „ni legu la Bibliion – tie estas ĉio“.

Rekomendita literaturo

- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Písmo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [*Biblio. La Malnova kaj Nova Testamento kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥe*]
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [*esperantlingve*]
- COUSSON, P. (2015): Jesuo, la Samarianino kaj ni. Dia Regno 1: 3-5.
- FISCHER, O.A. (2013): Libro de libroj, <http://www.medy.cz/brno-esperanto/fischer-libro-de-libroj.pdf>.
- FISCHER, O.A. (2015): Ludoviko Braille kaj Hieronimo Lorm, http://www.literatura.bucek.name/brno/fischer_braile-lorm.pdf.
- FIŠEROVÁ, B. (2015): Ĉerkoturneo. 1-a eld., Brno, MSD, 58 paĝoj (*el ĉeĥa lingvo esperantigis Oldřich. Fischer*). ISBN 978-80-7392-242-9.
- IKUE KAJ KELI (2001): Adoru, Ekumena Diserva Libro, 1-a eld., Ponto, CIP-Titelaufnahme der Deutsche Bibliothek, 1422 paĝoj. ISBN 3-9803793-5-3.
- KELI (2015): Tagordo por la jarkunveno de KELI 2015. Dia Regno 3: 65.

Strato antaŭ la hotelo C.I.A.R.U.S.



1

Prezidanto de Esperantista Klubo en Strasburgo
www.esperanto-strasbourg.net



2

Aŭskultantoj (katolikoj kaj nekatolikoj)



3

**Komitato de KELI dum jarkunveno (Pavel Polnický, Philippe Cousson,
Siegfried Krüger, Ágnes Ráczkvy-Eötvös, Bengt-Olof Åradsen,
Samuel Gaillard)**



4

Dum jarkunveno de KELI



5

**Mária László (prelego)
kaj Oldřich A. Fischer (vespera preĝo)**



6

Rivero ILL en Strasburgo



7

Strasburgo



8

Antaŭ preĝejo de Sankta Petro Juna



9

En preĝejo de Sankta Petro Juna



10

Katedralo estis konstruata dum la jaroj 1176-1439




11

Teatro en Strasburgo



12

La Sankta Biblio en Esperanto



13

Bibliaj tekstoj, kiuj estis kaŝe senditaj el Francio en Sovetunio dum socialismo, por ke helpu al kristanoj en Sovetunio



14

Eŭropa Parlamento



15

En Eŭropa Parlamento



16

En Eŭropa Parlamento



17

Gabriella Stier kaj Oldřich A. Fischer en Eŭropa Parlamento



18

En Eŭropa Parlamento



19

En Eŭropa Parlamento



20

Esperantistoj en Eŭropa Parlamento



21

En sinagogo. Toraĵoj en Sankta ŝranko (Aron hakodeŝ)



22

En sinagogo



23

Murego de alzaca urbo Obernai



24

En alzaca urbeto Obernai



25

En Vogezoj



26

Francaj skoltoj kun pastro



27